

Komputeko (mallongigo de "Pri**komputila terminokolekto**") estas reta projekto de E@I (<https://ikso.net/projektoj/>), kiu celas kunigi la pri-komputilajn terminojn de diversaj vortaroj, por plifaciligi la aliron al kaj la komparon inter la diversaj vortaroj, kaj tiel stimuli ĝustan lingvouzon.

Yves Nevelsteen iniciatis Komputecon en 2006, kiam li laboris kiel tradukisto de komputilaj programoj. Kvankam la lingva paro angla-Esperanto ĉiam estis plej bone ellaborita, la projekto de la komenco estis plurlingva. Nuntempe (25 majo 2020) la interfaco de la retejo ekzistas en naŭ lingvoj. Por sep lingvoj ankaŭ ekzistas tradukoj; interkrampe aperas la kvantoj: la angla (11 200), Esperanto (11 041), la nederlanda (5240), la franca (3980), la germana (3590), la hispana (3289) kaj la pola (1387).

La nacilingvaj tradukoj precipe venas de listoj de Microsoft, Apple kaj Adobe. La ĉefaj Esperantaj vortaroj kaj vortlistoj, sur kiuj baziĝas la Komputeko, estas (laŭvice) la Komputada Leksikono de **Sergio Pokrovskij** (1600+), la WordPress-tradukejo de **Cindy McKee** (950+), la OpenOffice.org-tradukdosiero (850+), la Teknika Vortaro angla-pola-Esperanto de **Jerzy Wałaszek** (800+) kaj Computer Dictionary de **Christian Bertin** (750+). Kontribuis enhave al Komputeko interalie Cindy McKee, **Maŭro La Torre**, **Paul Peeraerts**, **Lode Van de Velde** kaj **Bertilo Wennergren**.

Yves Nevelsteen interalie aliĝis al la tradukskipoj de OpenOffice.org, Ipernity kaj Drupalo kun la celo helpi pri provlegado kaj disponigi la konkludojn de la diversaj skipoj al pli granda rondo pere de Komputeko. Intertempe preskaŭ ĉiuj Esperantaj tradukskipoj de programoj kaj paĝaroj uzas Komputecon kiel referencon por sia tradukado. Tio zorgis pri unuecigo de la komputila lingvo en Esperanto. Jen ĝojiga evoluo, ĉar *komputilaj vortoj* ne aperis/as en tradiciaj vortaroj kaj do antaŭe oni mem inventis vortojn. La kvalito de la tradukado estis ofte tre malbona, des pli ĉar foje komencantoj okupiĝis pri tio.

Libroj

Kunlabore kun **Peter Baláž**, aperis du paperaj verkoj de Komputeko, en 2008 kaj en 2012.

Dum la Ĵurnalista Kongreso en Vilnius en 2008 prezentiĝis la unua Komputeko-libreto. Ĝi enhavis 7500 tradukojn de usonanglaj prikomputilaj vortoj al Esperanto. Maŭro La Torre, siatempa membro de la Akademio de Esperanto, estis la ĉefa provleginto de la unua eldono. Cetere multe helpis Cindy McKee (ĉefa lingva konsilantino), Bertilo Wennergren (lingva konsilanto pri malfacilaj kazoj), Paul Peeraerts (provleginto) kaj Lode Van de Velde (provleginto). Eldonejo Espero, Partizánske, 2008, formato A5, 92 paĝoj, ISBN 978-80-969533-9-4.

Dua eldono de la Komputeko-libreto aperis kaj estis prezentita dum Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en aprilo 2012. Temas pri verko kun 7800 kapvortoj kaj pli ol 500 aldonoj kaj modifoj. En ĝi aperas ankaŭ bildvortareto kaj listo kun plej ofte uzataj prikomputilaj vortoj en pluraj lingvoj. **Edmund Grimley Evans**, akademiano kaj revizianto por la fako "komputiko" de la eldono 2002 de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, multe komentis pri la unua eldono kaj helpis tiel plibonigi la duan eldonon. **Marek Blahuš** interalie helpis pri kreado de la listo de plej uzataj prikomputilaj vortoj. Eldonejo Espero, Partizánske, 2012, formato A5, 124 paĝoj, ISBN 978-80-89366-14-9.



Kial papera versio?

Kiam mi en 2007 komencis la projekton Komputeko, la unua celo estis krei retejon, ne libron. Kiam Komputeko iĝis iom sukcesa, tamen pli kaj pli da homoj petis de mi krei paperan version. La unua ideo estis krei libreton por faciligi la provlegadon. Interalie Paul Peeraerts kaj Lode Van de Velde tiel provlegis la unuajn versiojn. Peter Baláz de E@I kontaktis min por krei profesie eldonitan Komputeko-libreton. Mi iom hezitis, ĉu vere krei 500 ekzemplerojn de tia verko pri fakterminoj, sed konvinkis min jenaj argumentoj:

- multaj esperantistoj daŭre preferas librojn al retejo; ili volonte aĉetas precipe vortarojn
- Kiki Tytgat diris al mi: "per traduko de Shakespeare vi ne konvinkos fakulojn pri tio ke Esperanto estas moderna, funkcia lingvo. Per viaj Komputeko-libretoj eble jes ja."
- nur surpaperajn verkojn oni konservas en bibliotekoj. Tial tre gravas ankaŭ eldoni ĝin.
- per aĉeto de libroj, esperantistoj povas subteni la agadon de E@I.
- rapide estis 250 antaŭmendoj, do ekzistis klara merkato por la verko.


Ĉar la unua eldono elĉerpiĝis ene de duona jaro, ni kreis ankaŭ duan eldonon en 2012.

Retejo

La unuan Komputeko-retejon programis la pola esperantisto **Tomek Stachowicz** de Varsovia Vento; helpis pri ĝi poste ankaŭ **Joop Kieft**. Ekde 2018 Yves Nevelsteen kaj **Robin van der Vliet** kunlaboras pri tradukado de Telegram al Esperanto (www.telegramo.org). La kunlaborado pli intensiĝis kaj ili eklaboris pri nova Komputeko-retejo (www.komputeko.net). Tia kunlaborado gravas, ĉar komputila lingvo rapide evoluas. Ĉiujare inter 2007 kaj 2020 estis aldonitaj/modifitaj minimume 500 eroj de la datumbazo... Komputeko iĝis krom aktuala vortaro, ankaŭ praktika ilo por la traduklaboro de diversaj projektoj. Plej bone ellaboritaj estas tiurilate Firefox, Telegram kaj WordPress.

Matthieu Desplantes de E@I zorgas pri la Komputeko-servilo teknike. En aprilo 2020 li ĝisdatigis ĝin de Debian 9 al Debian 10 kaj movis ĝin al pli potenca servilo. La domajnonomo <https://komputeko.net/> estas registrita ĉe <https://joker.com>.

Robin 25 majo 2020 lanĉis la novan Komputeko-retejon kaj agordis ĝin ĉi tiel:

- Ĉefa retejo kun serĉilo <https://komputeko.net/>
 - Elŝutejo
 - Libroj
 - Fontoj
 - Kontaktformularo
 - Subteni: ligilo al la Fonduso Instigo-Liberapay
- Komputeko-WordPress-“Pliejo” sub la butono  - <https://pliejo.komputeko.net>
 - Fonaj informoj pri la projekto
 - Utilaj ligiloj
 - Superrigardo de esperantigataj programoj kaj retejoj
 - Dokumentoj por tradukantoj (kun oftaj eraroj, konsiloj k.s.)
- Malnova retejo <https://malnova.komputeko.net>

La interfaco de Komputeko ekde 25 majo 2020 estas do **naŭlingva**, inkluzive de la rusa kaj persa! Eblas serĉi vortojn en sep lingvoj.

Ekzistas hela kaj malhela “retejaj reĝimoj”.

Robin zorgis pri tio, ke ĉiuj malnovaj ligiloj plu estas alireblaj. Li aldonis tion al .htaccess-dosiero:

```
htaccess - /home/rabin/komputeko/var/www/komputeko/www.komputeko.net - Geany
File Edit Search View Document Project Build Tools Help
htaccess
1 RewriteCond %{HTTP_HOST} ^komputeko\.net [NC]
2 RewriteRule ^index.php https://komputeko.net/ [L,NE,R=301]
3 RewriteRule ^index_de.php https://komputeko.net/ [L,NE,R=301]
4 RewriteRule ^index_en.php https://komputeko.net/ [L,NE,R=301]
5 RewriteRule ^index_eo.php https://komputeko.net/ [L,NE,R=301]
6 RewriteRule ^index_es.php https://komputeko.net/ [L,NE,R=301]
7 RewriteRule ^index_fr.php https://komputeko.net/ [L,NE,R=301]
8 RewriteRule ^index_nl.php https://komputeko.net/ [L,NE,R=301]
9 RewriteRule ^index_pl.php https://komputeko.net/ [L,NE,R=301]
10 RewriteRule ^elshutl.php https://komputeko.net/#!d [L,NE,R=301]
11 RewriteRule ^elsxutejo.php https://komputeko.net/#!d [L,NE,R=301]
12 RewriteRule ^elsxutejo-en.php https://komputeko.net/#!d [L,NE,R=301]
13 RewriteRule ^elsxutejo-es.php https://komputeko.net/#!d [L,NE,R=301]
14 RewriteRule ^fantoj.php https://komputeko.net/#!s [L,NE,R=301]
15 RewriteRule ^libro.php https://komputeko.net/#!b [L,NE,R=301]
16 RewriteRule ^libro-en.php https://komputeko.net/#!b [L,NE,R=301]
17 RewriteRule ^libro-nl.php https://komputeko.net/#!b [L,NE,R=301]
18 RewriteRule ^novajhletero1.html https://malnova.komputeko.net/novajhletero1.html [L,NE,R=301]
19 RewriteRule ^klavaro.html https://malnova.komputeko.net/klavaro.html [L,NE,R=301]
20 RewriteRule ^html-kodoprezento.htm(l)? https://malnova.komputeko.net/html-kodoprezento.htm [L,NE,R=301]
21 RewriteRule ^konvertilo.htm(l)? https://malnova.komputeko.net/konvertilo.htm [L,NE,R=301]
22 RewriteRule ^konvertilo-nova.htm(l)? https://malnova.komputeko.net/konvertilo-nova.htm [L,NE,R=301]
23 RewriteRule ^unikodo.htm(l)? https://malnova.komputeko.net/unikodo.htm [L,NE,R=301]
24 RewriteRule ^Android.php https://malnova.komputeko.net/Android.php [L,NE,R=301]
25 RewriteRule ^cxapelitaj.php https://malnova.komputeko.net/cxapelitaj.php [L,NE,R=301]
26 RewriteRule ^i05.php https://malnova.komputeko.net/i05.php [L,NE,R=301]
27 RewriteRule ^konsideroj.php https://malnova.komputeko.net/konsideroj.php [L,NE,R=301]
28 RewriteRule ^konvertilo.php https://malnova.komputeko.net/konvertilo.php [L,NE,R=301]
29 RewriteRule ^konvertilo-en.php https://malnova.komputeko.net/konvertilo-en.php [L,NE,R=301]
30 RewriteRule ^konvertilo-es.php https://malnova.komputeko.net/konvertilo-es.php [L,NE,R=301]
31 RewriteRule ^konvertilo-nl.php https://malnova.komputeko.net/konvertilo-nl.php [L,NE,R=301]
32 RewriteRule ^linuxo.php https://malnova.komputeko.net/linuxo.php [L,NE,R=301]
33 RewriteRule ^makintosxo.php https://malnova.komputeko.net/makintosxo.php [L,NE,R=301]
34 RewriteRule ^pri.php https://malnova.komputeko.net/pri.php [L,NE,R=301]
35 RewriteRule ^programaro.php https://malnova.komputeko.net/programaro.php [L,NE,R=301]
36 RewriteRule ^tajpi.php https://malnova.komputeko.net/tajpi.php [L,NE,R=301]
37 RewriteRule ^tajpi4.php https://malnova.komputeko.net/tajpi4.php [L,NE,R=301]
38 RewriteRule ^tajpi-en.php https://malnova.komputeko.net/tajpi-en.php [L,NE,R=301]
39 RewriteRule ^tajpi-es.php https://malnova.komputeko.net/tajpi-es.php [L,NE,R=301]
40 RewriteRule ^tajpi-fr.php https://malnova.komputeko.net/tajpi-fr.php [L,NE,R=301]
41 RewriteRule ^tajpi-nl.php https://malnova.komputeko.net/tajpi-nl.php [L,NE,R=301]
42 RewriteRule ^vindoza.php https://malnova.komputeko.net/vindoza.php [L,NE,R=301]
43 RewriteRule ^xk.php https://malnova.komputeko.net/xk.php [L,NE,R=301]
44 RewriteRule ^xk-en.php https://malnova.komputeko.net/xk-en.php [L,NE,R=301]
45
line: 45 / 45 | col: 0 | sel: 0 | INS TAB | mode: LF | encoding: UTF-8 | filetype: None | scope: unknown
```

GitHub

Ĉe la servilo de E@I estos la WordPress-instalaĵo kaj la datumdosiero. Ĉe GitHub estos la ĉefa retejo. La ĉefa retejo konsistas nur el HTML-paĝo kun iom da JavaScript-kodo. Ĝia kodo estos plene en GitHub, por ke aliaj ankaŭ povu kunlabori.


Cloudflare

Robin agordis Cloudflare por www.komputeko.net Cloudflare estas servo, kiu helpas retejojn kontraŭ kodrompistoj, aliaj minacoj, kaj kiu helpas rapidigi retejojn. Ili ankaŭ provizas senpagajn HTTPS-atestilojn. Kiam suspektinda persono iras al www.komputeko.net, Cloudflare povas unue montri CAPTCHA-paĝon al tiu vizitanto. Jam tio sufiĉe bone helpas kontraŭ spamistoj.

Vidu <https://www.cloudflare.com/>

Esperantigo de WordPress

WordPress estas libera programo kiun vi povas uzi por krei retejon, blogon aŭ aplikaĵon. Bertilo Wennergren publikigis esperantlingvajn versiojn de WordPress. La lasta kiun li tradukis, estas versio 2.5.1. En 2014, sub gvidado de Cindy McKee, la laboro rekomenciĝis kaj novaj teamanoj aliĝis.



Yves Nevelsteen antaŭ nelonge transprenis la kunordigadon de la WordPress-traduklaboro de Cindy McKee. Bertilo kaj Cindy multe laboris por traduki la tutan WordPress-programaron (inkluzive de la administrantejo). **Ĝin uzas retejoj kiel Libera Folio, La Ondo de Esperanto** kaj multaj aliaj. Ankaŭ la retejoj pliejo.komputeko.net kaj www.nevelsteen.info uzas WordPress.

Por profesieca Esperanta retejo gravas, ke ne subite ie aperu vorto en la angla. Necesas do investi tempon en la regula ĝisdatigo de la tuto.

New to Translating WordPress? Read through our Translator Handbook to get started.

Hide

Translation of 5.4.x - Development: Esperanto

Create Glossary

Bulk Actions

← 1 2 3 4 →

Filter ↓ • Sort ↓ • All (3,830) • Untranslated (195) • Waiting (0) • Fuzzy (54) • Warnings (0)

▣	Prio	Original string	Translation	—
▣		Error: This is not a valid feed template.	ERARO: Tio ne estas valida distribuata modelo.	Details
▣		Error: Couldn't register you… please contact the webmaster !	ERARO: Ne eblas registri vin… bonvolu kontakti la retejestron !	Details
▣		Error: This username is already registered. Please choose another one.	ERARO: Tiu ĉi uzantonomo jam estas registrita. Bonvolu elekti alian.	Details
▣		Sorry, the user could not be updated.	Pardonu, ne eblas ĝisdatigi la uzanton.	Details
▣		Featured image	Elstarigita bildo	Details
▣		Error: The themes directory is either empty or doesn't exist. Please check your installation.	ERARO: La etosa dosierujo estas malplena aŭ ne ekzistas. Bv. kontroli vian instalon.	Details
▣		Error: Please fill the required fields (name, email).	ERARO: Bv. plenigi la bezonatajn kampojn (nomo, retpoŝto).	Details
▣		Error: Please enter a valid email address.	ERARO: Bv. enskribi validan retpoŝtadreson.	Details
▣		Error: Please type a comment.	ERARO: Bv. enskribi komenton.	Details
▣		Error: Site URL already taken.	ERARO: Iu jam posedas tiun URL-on.	Details
▣		Error: Problem creating site entry.	ERARO: problemo dum kreo de enskribo al retejo.	Details
▣		Error: This username is invalid because it uses illegal characters. Please enter a valid username.	ERARO: La uzantonomo estas nevalida, ĉar ĝi enhavas nepermesatajn signojn. Bonvolu enigi validan uzantonomon.	Details
▣		Font size	Tipara grandeco	Details
▣		sound	Sono	Details
▣		Error: The username field is empty.	ERARO: La uzantonomo kampo estas malplena.	Details

Bulk Actions

← 1 2 3 4 →

Legend: ■ Current ■ Waiting ■ Fuzzy ■ Old ■ With Warnings

Import Translations • Export all current as Portable Object Message Catalog (.pot)

Ne estis tre praktike (kaj iom temporabe) serĉi konkretan vorton en la WordPress-tradukejo. La nova Komputeko-retejo ebligas rekte serĉi en la tradukejo, per alklako de la fonto WordPress en iu serĉrezulto. Ŝajnas esti ne tre grava aldono, sed por tradukantoj, tio estas ege tempoŝpariga!

Provu alklaki [WordPress] apud la vorto "aprobata" ĉe <https://telegramo.org/komputeko/#approved>

Esperantigo de Telegram

Kiam vi uzas Telegram, vi uzas unu el la diversaj aplikaĵoj por poŝtelefonoj kaj komputiloj. Nun la plej gravaj oficialaj aplikaĵoj de Telegram estas jam tradukitaj al Esperanto kaj provlegitaj de pluraj personoj.


Robin van der Vliet komencis tiun traduklaboron fine de 2015. En 2018 nova tradukejo estis lanĉita en kiu Esperanto trovis lokon. Ekde tiam Yves Nevelsteen kunlaboras pri la traduklaboro. Por Telegram ni multe uzis kaj kontribuis al la projekto Komputeko. Komence de aprilo 2020 la traduko estis finpretigita por ĉiuj oficiale tradukeblaj versioj. Entute temas pri pli-malpli 14 300 frazoj.

La traduko tamen ankoraŭ ne estas oficiala. Por helpi oficialigi ĝin, vi povas uzi kaj testi la tradukon (kaj inviti viajn Esperanto-amikojn amase ankaŭ uzi ĝin), por trovi la lastajn erarojn kaj por montri al Telegram, ke ĝia oficialeco estas dezirata de la komunumo.

Se vi volas kontribui al la traduko kaj partopreni en diskutoj pri ŝanĝoj, vi ankaŭ povas aliĝi al la Telegram-grupo @translation_eo. Tio estas la plej bona loko por atentigi nin pri eble trovitaj eraroj. Robin van der Vliet iniciatis la Esperanto-tradukon de Telegram. Ĉi tiu senpaga nuba tujmesaĝilo intertempe iom famiĝis inter esperantistoj. Ni uzas ĝin ankaŭ por grupe pridiskuti tradukojn de prikomputilaj vortoj en Esperanto.

Kelkaj personoj helpis/as pri la (ne subtaksinda!) traduklaboro, sed Robin estas la sola kiu aprobas tradukojn. Ni fintradukis Telegram Desktop kaj provas la aliajn versiojn (Android, Android X, iOS kaj MacOS) traduki antaŭ la somero.


Samkiel por WordPress, Robin kreis en la nova Komputeko-retejo rektan ligon kun la Telegram-tradukejo. Provu alklaki [Telegramo] apud la vorto "movbildo" ĉe <https://telegramo.org/komputeko/#movbildo>



The screenshot shows the Komputeko website interface. At the top, there is a navigation bar with the Komputeko logo and icons for Ellutejo, Libro, Fontoj, and Pli. On the right, there are links for GitHub, Malhale, and Lingvo. Below the navigation bar, there is a search bar containing the word 'movbildo' and a dropdown menu labeled 'Elekti lingvojn'. The main content is a table with five columns: Angle, Esperante, Nederlande, France, and Germane. The table lists various translations for 'movbildo' in different languages, with some entries highlighted in yellow.

Angle	Esperante	Nederlande	France	Germane
animated GIF	GIF-movbildo	GIF-animatie	image GIF animée	animiertes GIF
animated image	movbildo (Telegramo); GIF-movbildo	bewegend beeld	image animée	bewegtes Bild
animation	movbildo; animacio (Rezo Verström)	animatie	animation	Animation
Flash animation	Flash-movbildo	Flash-animatie		
GIF; animated GIF	movbildo (Telegramo)			
GIF animation	GIF-movbildo (Maŝna la Turo)	GIF-animatie	animation GIF	GIF-Animation

Gravas konscii, ke traduko de komputila programo ne estas unufoja laboro. Regule estas aldonoj kaj ŝanĝoj; tradukojn tiuokaze iu kompletigu. Sen aktualigado, la kvalito de la traduko post iom da tempo ne plu estos sufiĉe bona, kaj subteno por Esperanto riskas esti forigata.




La Telegram-grupo Komputeko

63 homoj intertempe jam aliĝis al la Telegram-grupo grupo <https://komputeko.telegramo.org/>

Ni diskutas en tiu grupo pri komputilaj vortoj kaj projektoj.

The screenshot shows a Telegram chat interface. On the left is a list of contacts, and on the right is the chat history for the group 'Komputeko' (53 members, 16 admins). The chat shows a discussion about the Esperanto word for 'array' or 'matrix'. A user named Robin van der Vliet asks 'Ĉu matrica tabelo?' (Is it a matrix table?). Another user, Chuck Smith, replies 'Nu, Matrico ankaŭ ne vere taŭgas laŭ mi. Tial mi petas opiniojn pri tio.' (Well, Matrix is also not really suitable for me. I am asking for opinions on this). Robin van der Vliet then explains: 'Eble array = matrico, kaj ne 'tabelo'. Laŭ PIV estas "tabelo", senco 5: <http://vortaro.net/#tabelo>'. Sean Healy adds: 'Mi ne bone komprenas la diferencon; ne estante programisto.' (I don't understand the difference; not being a programmer). Sean Healy also asks: 'Kaj "associative array" (PHP) / "dict" (Python) / "hash" (Perl) / "map" (C++) / ktp? Kiel vi esprimus tion?' (And "associative array" (PHP) / "dict" (Python) / "hash" (Perl) / "map" (C++) / etc? How would you express that?). Chuck Smith replies: 'Mi ne scias, ĉu tiuj terminoj jam havas alian signifon en esperanta komputado, sed ili ŝajnas taŭgaj al mi.' (I don't know, but these terms already have another meaning in Esperanto computing, but they seem suitable to me). Sean Healy concludes: '(Se mi bone memoras, ne estas efektiva diferenco en PHP; la indicoj estas ĉenoj anstataŭ nombroj, sed la sintakso samas.)' (If I remember correctly, there is no effective difference in PHP; the indices are chains instead of numbers, but the syntax is the same.)

DuckDuckGo en Esperanto



DuckDuckGo estas interreta serĉilo kiu utiligas informojn de homamase alportitaj retejoj kiel ekzemple Vikipedio por akiri siajn rezultojn. La serĉilopolitiko diras ke ĝi protektas privatecon, kaj ne registras uzanto-informojn. Ĉar uzantoj ne estas profilitaj, la "filtriloveziko" povas esti evitita, kie al ĉiuj uzantoj estas montritaj la samaj serĉorezultoj por antaŭfiksita serĉvorto.

Jam de iom da tempo ekzistis traduko de DuckDuckGo en Esperanto, sed ĝi ne estis tre bonkvalita. Yves kaj Robin fine de majo 2020 provlegis kaj plibonigis ĝin.

<https://duckduckgo.com/>

Oftaj eraroj kaj senerarigo

Robin kaj Yves kunlaboris por en Vikipedio per roboto aŭtomate korekti evidentajn erarojn.

Ekzemple:

<i>ankau</i>	ankaŭ	<i>laplej</i>	la plej	<i>partpreni</i>	partopreni
<i>ankorau</i>	ankoraŭ	<i>mensaĝo</i>	mesaĝo	<i>partprenis</i>	partoprenis
<i>ankraŭ</i>	ankoraŭ	<i>monopolar</i>	monopolaj	<i>partpreno</i>	partopreno
<i>akaŭ</i>	ankaŭ	<i>mortinoj</i>	mortintoj	<i>pejsaĝo</i>	pejzaĝo
<i>anakŭ</i>	ankaŭ	<i>nakis</i>	naskis	<i>plei</i>	plej
<i>akdemio</i>	akademio	<i>nakiĝis</i>	naskiĝis	<i>plejn</i>	plej
<i>anektis</i>	aneksis	<i>naskĝis</i>	naskiĝis	<i>prekaŭ</i>	preskaŭ
<i>anstatuigis</i>	anstataŭigis	<i>naskighis</i>	naskiĝis	<i>preĝejon</i>	preĝejon
<i>anstatŭ</i>	anstataŭ	<i>nomom</i>	nomon	<i>sajnas</i>	ŝajnas
<i>aprtenas</i>	apartenas	<i>norokcidente</i>	nordokcidente	<i>sajnis</i>	ŝajnis
<i>artfarita</i>	artefarita	<i>norokcidenta</i>	nordokcidenta	<i>sajne</i>	ŝajne

<i>atingebals</i>	atingeblas	<i>nororiento</i>	nordoriento	<i>samekiel</i>	same kiel
<i>atikolo</i>	artikolo	<i>nororiente</i>	nordoriente	<i>positiva</i>	pozitiva
<i>enkoraŭ</i>	ankoraŭ	<i>nororienta</i>	nordorienta	<i>projeto</i>	projekto
<i>ghis</i>	ĝis	<i>nutraĵoj</i>	nutraĵoj	<i>remarkis</i>	rimarkis
<i>giaj</i>	ĝiaj	<i>okzais</i>	okzais	<i>renkontigejo</i>	renkontiĝejo

Pli kaj pli ni provas korekti erarojn en diversaj projektoj samtempe, por levi la kvaliton. Jen ekzemplo:

- "no images found" tradukiĝas per "neniu bildo trovita" - ne estu pluralo en Esperanto!

Ĉar facilas traserĉi plurajn tradukejojn ekde la nova Komputeko-retejo, "neniuj" iĝis "neniu" ne nur en la Komputeko-datumbazo, sed ankaŭ en Telegram kaj en WordPress.


neniuj	
Engels	Esperanto
no categories	neniuj kategorioj [WordPress]
no sidebars defined	neniuj difinitaj flankpaneloj [WordPress]

New to Translating WordPress? Read through our [Translator Handbook](#) to get started. Hide

Translation of 5.3.x - Development: Esperanto Create Glossary

Bulk Actions Filter • All (3,706) • Untranslated (0) • Waiting (0) • Fuzzy (0) • Warnings (0) ← 1 2 →

<input type="checkbox"/>	Prio	Original string	Translation	—
<input type="checkbox"/>		No images selected	Neniuj bildoj elektitaj	Details
<input type="checkbox"/>		No changes saved yet, so there is nothing to trash.	Neniuj ŝanĝoj estis konservitaj, do ekzistas nenio por enrubigi.	Details
<input type="checkbox"/>		Whether to hide terms not assigned to any posts.	Ĉu kaŝi terminojn asignitajn al neniuj afiŝoj.	Details



Plibonigo de Google Translate

En septembro 2017, Google multe plibonigis Google Translate per “neŭra maŝintradukado” por 96 lingvoj, inkluzive de Esperanto. Neŭra maŝintradukado uzas kompleksan procesadon por simuli kiel homo lernas lingvon. Pliboniĝoj estas plej rimarkindaj en tutaj frazoj kaj pli longaj tekstoj.

Vi povas mem kontribui al Google Translate tradukante kaj aprobante frazojn:

<http://mallonge.net/guglo-kontribui>

Robin kaj mi regule kontribuas al Google Translate. Tio helpas iom post iom plibonigi la tradukan kvaliton. Anstataŭ korekti proponitan tradukon poste, ni rekte tion faras en la retejo mem:

Text Documents

DETECT LANGUAGE FRENCH DUTCH GERMAN ENGLISH ESPERANTO FRENCH

General Questions

Q: What is Telegram? What do I do here?

Telegram is a messaging app with a focus on speed and security, it's super-fast, simple and free. You can use Telegram on all your devices at the same time – your messages sync seamlessly across any number of your phones, tablets or computers.

With Telegram, you can send messages, photos, videos and files of any type (doc, zip, mp3, etc), as well as create groups for up to 200,000 people or channels for broadcasting to unlimited audiences. You can write to your phone contacts and find people by their usernames. As a result, Telegram is like SMS and email combined – and can take care of all your personal or business messaging needs. In addition to this, we support end-to-end encrypted voice calls.

Translate from: English

Generalaj Demandoj


Q: Kio estas Telegram? Kion mi faras ĉi tie? Telegram estas tujmesaĝilo kun fokuso je rapideco kaj sekureco, ĝi estas rapidega, simpla kaj senpaga. Vi povas uzi Telegram en ĉiuj viaj aparatoj samtempe - viaj mesaĝoj sinkroniĝas perfekte kun ĉiuj ajn kvanto de telefonoj, tabuloj aŭ komputiloj. Per Telegram, vi povas sendi mesaĝojn, fotojn, filmetojn kaj dosierojn de ajna speco (doc, zip, mp3, ktp.). Kaj ankaŭ krei grupojn por ĝis 200 000 homoj aŭ kanalojn por elsendo al senlimaj celgrupoj. Vi povas skribi al viaj telefonaj kontaktoj kaj trovi homojn per iliaj uzantnomoj. Rezulte, Telegram similas al SMS kaj retpoŝto kombinitaj - kaj povas prizorgi ĉiujn viajn proprajn aŭ komercajn mesaĝajn bezonojn. Krom ĉi tie, ni subtenas fin-al-finajn ĉifritajn voĉvokojn.

Thank you for contributing
Your contribution benefits millions of Translate users
LEARN MORE



Plibonigoj de la Komputeko-retejo

La ĉefa kaj plej okulfrapa plibonigo de la nova Komputeko-retejo estas ĝia tutnova aspekto kaj la tujserĉado. Ne plu necesas alklaki butonon por ekserĉi vorton; rezultoj tuj aperas. Tio estas sufiĉe impona kaj nova teknologio. Estas tamen multe pli da novigoj kaj plibonigoj:


- estis teknikaj malfacilaĵoj pri la serĉado de la fontoj Komputada Leksikono, Telegram kaj WordPress. Bone funkcias nun; tio multe helpas tradukskipojn labori pli rapide kaj efike.
- Komputeko nun bone uzeblas sur diversaj porteblaj aparatoj; tio estas granda paŝo antaŭen. Oni jam povas instali Komputecon kiel ret-aplikaĵon poŝtelefono. Ĝi funkcias samkiel ĉiuj aliaj aplikaĵoj en Android, iOS kaj iPadOS.



- eblas elekti la diversajn lingvo-kolumnojn en tre praktika maniero
- la nombro de terminoj el la unuopaj fontoj estas aŭtomate ĝisdatigata en <https://telegramo.org/komputeko/#!s>
- antaŭe aperis nur (alklakeblaj) fontindikoj por Esperanto. Nun eblas aldoni fontojn por ĉiu lingvo.
- mi aldonis diversajn variantojn de anglaj terminoj al Komputeko, foje ankaŭ nekutimajn aŭ eĉ ne ekzistantajn – simple ĉar la angla ne ekzistas kaj ĝia ortografio ne estas regula. Robin tial ekprogramis malprecizan (svagan) serĉadon: la spaceto-signo nun estas tute ignorita en la serĉado. Do kaj per "screenfont" kaj per "screen font" oni trovas kaj "screenfont" kaj "screen font". Programi malprecizan serĉadon iom malfacilas; poste ni ankoraŭ plibonigos.
- ĉu en la angla aldoni streketon aŭ ne (online / on-line, layout / lay-out), tio estas alia fascina temo. Por faciligi la serĉado, nun ankaŭ streketoj estas ignorataj.
- ni klare indikas nun, ĉu temas pri unonangla aŭ britangla vorto:

colour	
Angle	Esperante
 admin color scheme (<i>usone</i>); admin colour scheme (<i>brite</i>)	kolorskemo por administrado <i>[WordPress]</i>
 background color (<i>usone</i>); background colour (<i>brite</i>)	fona koloro <i>[WordPress]</i>

- la proceduro por ĝisdatigi la Komputeko-datumbazon okazis per Excel kaj estis tre komplika. Enhava ĝisdatigo de la retejo tial okazis nur averaĝe unufoje jare. Datumoj nun estas "en la nuboj", en Google Sheets. Ĝisdatigo nun daŭras nur 10 sekundojn (eĉ se temas pri provizora solvo) kaj povas okazi aŭtomate ĉiunokte!
- la sistemo estas tre facile etendebla al novaj lingvoj, sen grandaj ŝanĝoj al la programkodo. Por pruvi tion, la interfacoj de la retejo eĉ estas disponeblaj en la persa! Robin ĉefe elektis tiun lingvon, por bone testi la inversan aranĝon.



The screenshot shows a website interface with a language selection menu. The menu is open, displaying a list of languages: Esperanto, Nederlands, English, Français, Deutsch, Español, Polski, and فارسی. The background shows a Persian language interface with text in Persian script, including a navigation bar with icons for language, search, and other functions.

- aldoneblas al la datumbazo ankaŭ evitindaj vortoj. La vorto aperas ruĝe kiam oni serĉas ĝin, kaj ne aperas kiam oni serĉas kapvorton en alia lingvo:

Komputeko ☰

diĝita| x Elekti lingvojn ▾

	Angle	Esperante	Nederlande	France
	digital	bit- <i>[PIV 2002]</i> ; cifereca <i>[Komputada Leksikono]</i> <i>[LibreOffice]</i> ; diĝita <i>[Reta Vortaro]</i>	digitaal	numérique

Komputeko ☰

digital| x Elekti lingvojn ▾

	Angle	Esperante	Nederlande	France
	analog-to-digital converter	bitigilo <i>[PIV 2002]</i> ; ciferecigilo <i>[Komputada Leksikono]</i>	analoog-digitaal omvormer <i>[Viestra]</i> ; A/D-omzetter <i>[ICT VNU]</i>	
	born digital	bitnaskita		
	desktop publishing; DTP	perkomputila eldonado <i>[Komputada Leksikono]</i> <i>[Wikipedia]</i>	computer-ondersteunde publicatie <i>[Viestra]</i> ; digitale thuispublicatie <i>[Stichting]</i>	publication assistée par ordinateur
	digital	bit- <i>[PIV 2002]</i> ; cifereca <i>[Komputada Leksikono]</i> <i>[LibreOffice]</i>	digitaal	numérique

- ni korektis multajn diversajn erarojn en la datumbazo. Ĉu vi trovis alian eraron? Alklaku la butonon maldekstre informu ni: malfermiĝas ŝprucfenestro, en kiu oni povas meti proponojn/korektojn pri vorto. Pri novaj komputilaj vortoj, oni precipe diskutas en la Telegram-grupo <https://komputeko.telegramo.org> Helpantoj tre bonvenas!



Komputeko

59 members, 14 online

<https://komputeko.telegramo.org/>

Grupo pri komputilaj vortoj kaj projektoj.

JOIN GROUP

Proponi tradukon aŭ ŝanĝon ✕

Angle	Esperante	Nederlande	France
bandwith profiler	testilo de kapacito		testeur de bande passante

Nomo

Retpoŝtadreso

Mesaĝo

"bandwith" estu "bandwidth"

Poste en la Telegram-kanalo "Komputeko-administraĵoj" ni ricevas ĉi tian mesaĝon:



Jen ekzemploj de korektitaj eraroj:

<p>Anglaj korektoj:</p> <p>"bandwith" estu "bandwidth"</p> <p>"capitilisation" estu "capitalisation"</p> <p>"capitilization" estu "capitalization"</p> <p>"caroussel" estu "carousel"</p> <p>"click fraude" estu "click fraud"</p> <p>"clickfraude" estu "clickfraud"</p> <p>"eligibile" estu "eligible"</p> <p>"hight" estu "height"</p> <p>"improvement" estu "improvements"</p> <p>"independant" estu "independent"</p> <p>"miscellanious" estu "miscellaneous"</p> <p>"occurence" estu "occurrence"</p> <p>"password haching" estu "password hashing"</p> <p>"permantly" estu "permanently"</p> <p>"pornographie" estu "pornography"</p> <p>"powerfull" estu "powerful"</p> <p>"preformated" estu "preformatted"</p> <p>"propagated erro" estu "propagated error"</p> <p>"quailty" estu "quality"</p> <p>"requirment" estu "requirement"</p> <p>"seperate" estu "separate"</p> <p>"seperator" estu "separator"</p> <p>"transferrable" estu "transferable"</p> <p>"transscribe" estu "transcribe"</p> <p>"windowsless" estu "windowless"</p> <p>"writeable" estu "writable"</p>	<p>Nederlandaj korektoj:</p> <p>#1167: "calibreren" estu "kalibreren"</p> <p>#1168: "calibratie" estu "kalibratie"</p> <p>#1752: "bijgelevers" estu "bijgeleverd"</p> <p>#2004: "besturing" estu "besturen" (ĉar tie temas pri verbo)</p> <p>#2693: "DHCP Client" estu "DHCP-client"</p> <p>#2919: "DNS server" estu "DNS-server"</p> <p>#5118: "geauthoriseerde" estu "geautoriseerde"</p> <p>#7895: "gewone uitdrukking" estu "reguliere expressie"</p> <p>#8279: "RSS feed" estu "RSS-feed"</p> <p>#8944: "sms-je" estu "sms'je"</p> <p>#9731: "textueel" estu "tekstueel"</p> <p>#10000: "Truetype lettertype" estu "TrueType-lettertype"</p> <p>#10325: "gebuiker" estu "gebruiker"</p>
--	--

Fonduso Instigo

Homoj kiuj kontribuas al komunaj bezonas vian subtenon. Konstruado de libera programo, disvastigado de libera scio... - tiuj aferoj postulas tempon kaj kostas monon, ne nur por fari la komencon laboron, sed ankaŭ por poste daŭrigi ĝin.

Evidentiĝas ke homoj volonte subtenas konkretajn projektojn, kondiĉe ke oni serioze laboras kaj montras rezultojn. Tial, laŭ ekzemplo de Bertilo Wennergren <https://eo.liberapay.com/Bertilo>, ni kreis Liberapay-konton por kelkaj interretaj projektoj: <https://eo.liberapay.com/instigo>.

Liberapay estas maniero por periode donaci monon al homoj, kies laboron vi ŝatas. La sistemo de periodaj donacoj de Liberapay estas desegnita por provizi stabilan amasfinancitan bazan enspezon al kreantoj, ebligante ilin daŭre fari la laboregon, kiu profitas al ĉiuj.

Ni interalie elektis Liberapay por nia fonduso, ĉar

- 1) Liberapay estas malfermita projekto; ĉiu povas helpi traduki ĝin kaj plibonigi ĝian kodon. Ĝia retejo intertempe ekzistas tute en Esperanto. Vanege tradukis ĝin kaj Yves korektis, uzante la servon en praktiko.
- 2) Liberapay ne prenas parton de pagoj, kaj estas financata nur de donacoj al sia propra konto. La kostoj varias laŭ provizanto de pagservo, pagmetodo, landoj kaj valutoj. Sed kompare kun similaj retejoj, Liberapay estas unu el plej bonaj (<https://wiki.snowdrift.coop/market-research/other-crowdfunding>)



Fonduso Instigo

@instigo

Eventa Servo, Komputeko, esperantigo de programoj kaj retejoj. Sub la aŭspicio de UEA.

instigo ricevas € 10,19 semajne el 3 donacantoj. Celo: € 50,00

Donaci



Instigo-Liberapay, **sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio**, subtenas Esperanto-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto kaj aliaj satelitaj agadoj. Yves Nevelsteen, komisiito de UEA pri reta agado, gvidas la laborojn.

Jen superrigardo de la diversaj projektoj, kiujn vi subtenas per donaco al Instigo-Liberapay.

Eventa Servo (www.eventaservo.org) estas moderna internacia kalendaro pri Esperanto-rilataj eventoj. Fernando Ŝajani kaj Yves Nevelsteen respondecas kaj multe okupiĝas pri la retejo Eventa Servo nome de UEA kaj TEJO. Via subteno helpas teni la retejon funkcia kaj instigas konstante provizi plibonigojn al ĝi. Subtenu ĝin ankaŭ per aldono de viaj eventoj kaj registro de via organizo kaj de vi mem kiel uzanto!

Komputeko (www.komputeko.net) estas prikomputila terminokolekto. Multaj homoj pretas iom helpi pri tradukado, sed gravas bona, daŭre aktualigata vortaro kaj iu, kiu kunordigas kaj instigas/dankas kunlaboradon. Sen tio tre indaj tradukprojektoj kiel Komputeko ne progresas aŭ eĉ mortas. Menciindas, ke Yves Nevelsteen kunlaboras kun Robin van der Vliet pri tutnova retejo por komputeko. Estas multe da laboro, sed tre indas subteni!

Tradukado de Telegram (www.telegramo.org) kaj **WordPress** (www.wordpress.com) al Esperanto: Robin van der Vliet estas la ĉefa tradukanto (al Esperanto) kaj disvastiganto de Telegram en Esperantujo. Yves transprenis la traduklaboron de WordPress de Cindy McKee laŭ peto de Kalle Kniivilä, ĉar interalie ĝin uzas la retejo Libera Folio. Ambaŭ traduklaboroj samtempe uzas kaj estas gravaj fontoj por novaj vortoj en Komputeko. Gravas instigi al ĉiam-aktuala traduko de tiuj kaj aliaj platformoj, kiuj utilas al esperantistoj kaj montras la uzatecon de Esperanto!

Vikipedio, Vikidatumoj kaj aliaj vikimediaj retejoj (eo.wikipedia.org) estas nemezureble gravaj por la teno de la memoro de Esperanto kaj ankaŭ por montri la diversecon de la uzo de nia lingvo. Yves kaj Robin programas per robotoj lingvan korektadon en Vikipedio kaj instigas al verkado kaj ligado de interesaj artikoloj, partnerece kun la faka grupo Esperanto kaj Libera Scio, kun kiu UEA kunlaboras. Via subteno instigas al la ĝisdateco kaj daŭra riĉigo de la enhavo de Vikipedio kaj rilataj retejoj!

Eksterrete (www.nevelsteen.info/eksterrete): Ĉio troviĝas sur interreto, sed gravas gvidi homojn kaj indiki, kio konkrete interesas kaj aktualas. Tial Eksterrete! Temas pri regule aperantaj paperaj libretoj kun retaj indaĵoj, kiujn kreas Yves en Belgio. Kompreneble ne sufiĉas krei tian verkon unufoje: necesas ĝin regule ĝisdatigi. Via subteno instigas al la regula aperigo de Eksterrete, kiu estas ilo aparte utila por pli aĝaj esperantistoj. Estas ĝoje ĝentile provizi al ili tiujn libretojn - kaj via subteno ebligas tion!

Markolibro (www.nevelsteen.info/markoj): Neesperantistaj asocioj kaj firmaoj, kiuj tamen konscie elektas nomon en Esperanto estu niaj ambasadoroj! Esperanto estas pli populara ol tiom, kiom multaj imagas. La Markolibro ne nur helpas esperantistojn konscii pri grupoj, kiuj mem elektas nomon en Esperanto, sed montras al tiuj grupoj, ke nia komunumo pozitive atentis pri ili. Tio naskas eblojn pro pluraj kunlaboroj kun grupoj, kiuj agadas komerce aŭ pri aliaj kampoj de nia socio. Yves intertempe laboras pri nova, kvinlingva eŭropa Markolibro, kiu povos evolui al alikontinentaj markolibroj. Temas pri longedaŭra projekto. Regule aperas novaj markonomoj. Via subteno estas nepre instigo al tio!

Yves Nevelsteen ĉiujare detale raportas pri Fonduso Instigo per aparta broŝuro. Raporto pri 2019 estas disponebla por interesatoj.